5-a Jaro. N-o 214 APERAS SEMAJNE 8. Novembro 1928



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

DATREVENO DEKJARA KAJ – DEKUNUJARA

Dekunua de Novembro. 11-a horo matene. Batalhalto! La kanonoj ĉesas tondri post pli ol kvarjara kutimiĝo al sia metio, la maŝinpafiloj ne plu kraketas, kaj ne plu timeme kaŝiĝas kapoj de buĉotoj profunden en la marĉo de tranĉeoj.

La supervivantoj ĝoje refluas en siajn hejmojn. Kvankam en sia plimulto ne plu konvinkitaj pri la utilo de tia buĉado, kvankam multaj forĵetintaj la kredon pri trompa patrio — tamen ĉiuj estas plenaj de espero kaj fido je pli bona estonto! Nun ili volas ĝui familian feliĉon, esti bonaj edzoj, bonaj patroj, ne plu okupi sin pri io alia ol krei iom da propra bonstato. Sed dume la supersaĝaj diplomatoj komencis ludi sian rolon cedinte tiom longe la kampon al la marŝaloj.

11. novembro komenciĝis la traktado por krei la "pacon": oni faris la bilancon de l' milito, oni kalkulis kaj skribis kontojn. Kaj oni nove dividis la mondan posedaĵon. Antaŭ 10 jaroj principe decidis regantoj kaj potenculoj pri la evoluo de nia nuna epoko, skizante la traktatojn de Versaj', Trianon kaj Sen Ĵermen', kaj la pli malfruajn de Spa kaj Lokarno. Oni decidis pri la sorto de tutaj popoloj kiel pri negocaĵo, ŝanĝis arbitre la geografian kartaron, naskis Polion, Ĉeĥoslovakion, Jugoslavion, la baltajn ŝtatetojn, pligrandigis Rumanion, Grekion, malaperigante Turkion el Eŭropo. Kaj en tiuj tagoj estis projektata la Ligo de Nacioj, ligo de unuiĝantaj ŝuldantoj, por sin defendi kontraŭ la superega kreditoro — la plej granda militprofiteginto — Usono.

La batalhalton tempe nur malmulte antaŭis la disfalo de du monarkioj, la ŝanĝo de registaro kaj de regformo en Germanio kaj Aŭstrio-Hungario. Kaj efektive ne nur okazis simpla ŝanĝo de etiketoj, forpelo de imperiestroj ktp. La revenantaj soldatoj, unuiĝantaj kun la enlandaj laboristoj, formis la tielnomatajn laborist- kaj soldat-sovetojn, kiuj dum kelkaj monatoj ludis sufiĉe gravan rolon kaj posedis efektivan influon.

Ne malrekonebla la influo de alia okazintaĵo, kiu jaron antaŭe versence "skuis la mondon", kiel esprimis sin bonkonata verkisto: la Oktobra Revolucio en Rusio, kiu signifis komenciĝon de nova epoko en la mondhistorio . . .

En Germanio kaj Aŭstrio la nove kreitaj respublikoj restis burĝe regataj malgraŭ tio, ke la tiea industri-laboristaro prezentas tre grandan elcenton de l' loĝantaro kaj la laboristaj organizoj estis tre multmembraj en la postmilitaj jaroj. Ne estas ĉi tie la loko, por esplori la kaŭzojn, pro kiuj la laboristaro ne povis pli efikigi sian influon kaj kial post 10-jara ekzisto de tiuj respublikoj la proletaro eĉ multon devis cedi al la burĝoj da unuatempe akirita posedo.

Dekjara epoko montras bone, kiom relativaj estas ĉiuj politikaj venkakiroj sen socia struktur-ŝanĝo. La "venkintaj ŝtatoj" eĉ faris la saman sperton, precipe pro la ĉiam pli kreskanta ekonomia supereco de Usono, kiu minacas per sufoko venkintojn same kiel venkitojn de la milito kaj naskas sub niaj okuloj defendmovojn kiel, la movadon por Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo ktp.

Estas dume nur unu ŝtato, kiu okupas sendube unikan pozicion, tiu estas S o v e t i o. Dum la kanonoj de l' mondmilito tondris sur ĉiuj militfrontoj, dum nek unu nek la alia partio cedis, dum pri paco sen venkintoj nek venkitoj neniu volis pensi, la germana registaro kaj ĝiaj militgeneraloj kredis povi grave utili al sia propra afero, permesante al la socialistaj agitistoj — Lenin kaj Radek — eniri Rusion. Hodiaŭ ili plore konfesas, kiom ili mispaŝis. Ĉar certe je neniu alia lando tiom efikis la modelo de Sovetio, kiom je Germanio kun ĝia forta laboristaro, kaj nenie tiom da bataloj estis necesaj por bridi — almenaŭ dumtempe — la revolucian movadon.

Ni ne recitu hodiaŭ la historion de l' Rusa Revolucio. Ĝia influo je la fino de l' eŭropa milito — unu jaron poste — hodiaŭ antaŭ jardeko — estas nekontraŭdirebla. Ĝi pendis kiel nigra ombro super la mondo. Kaj hodiaŭ, post dekunu jaroj, ankoraŭ ĝi pendas kiel nigra ombro super la mondo kapitalista . . .

En tiuj tagoj ni havas bonan okazon observi la malunuecan spiritostaton kreitan inter la popoloj sur bazo de l' politik-ekonomiaj cirkonstancoj: En la "venkintaj" ŝtatoj oni tradicie solenas la batalhaltan tagon. Kaj la laboristaro — grandparte malmulte klaskonscia — ne havas efektivan povon por kontraŭstarigi al tiu soleno sian imponan kontraŭdiron. En la "venkitaj" ŝtatoj, kie la laboristaro depost la militfino akiris iom pli da reala influo, oni lasas al la naciistaj rondoj maldolĉajn konsiderojn pri "nacia mizero", kaj fakte la sociaj problemoj, ektuŝitaj,

DATREVENA MEMORIGO

Okaze de la 11. Novembro estas interese por la Legantoj rerigardi, kiel en Francio[1] *oni blufis dum kaj tuj post la milito. Jen kelkaj elektitaj d roj de famaj ĵurnalistoj kaj verkistoj, ministroj kaj episkopoj.*

"Ĉiu soldata kadavro fariĝas astro en la elpurigita ĉielo."
Bonnefon (1916).

*

"Neniam Francio estis pli granda, neniam la homeco iris pli alten."
Deŝanel (fr.: Deschanel).

*

"Jes, la milito estas vere la regenerado."
Burĵe (fr.: Bourget) en Eĥo de Parizo (1913).

*

"Oni ofte rimarkis, ke post la militoj okazas multaj krimoj. Ĝuste la rakonto pri la krimoj montras, kiom malgravaj estas la vivoj." Burĵe (1921).

*

"Urĝis, ke okazu milito por revivigi en Francio la senton pri idealo kaj dieco."
Generalo Rebijo (fr.: Rebillot), (1914).

*

"Feliĉaj malgraŭ la funebro estas la familioj, kies sango fluas por la patrio."
Generalo Rebijo (1914).

*

"Tiuj kvazaŭ-dioj kote vestitaj..."
A. Herman (fr.: Hermant), (1915).

*

"Kiam la gepatroj de germanaj soldatoj sciiĝos, ke siaj infanoj ne nur estis mortigataj, sed ke oni el ili faris oleon kaj sapon, jes sapon..., kian bruegon ili faros kontraŭ sia imperiestro..."
La Kruco (religia gaz.), (2. 5. 17).

*

"Post kvin etapoj la kozakoj estos en Berlino." La Mateno (24. 8. 14).

*

"Laŭ statistikoj, Germanio havas nutraĵon nur por kvin monatoj." (1914).

[1] En germanaj gazetoj oni facile povus kolekti similajn "perlojn". Oni vidu ekz. en n-o 206 (fruntartik. "Eklezio kaj Militarismo") la citojn el paroladoj de germanaj pastroj.

"La plej modesta, kiu militas por Francio, akiras per tio la animon de reĝo."
Bares (fr.: Barrès) en Eĥo de Parizo (5. 4. 15).

*

"La milito estas de dieca deveno."
Generalo Ŝerfis (fr.: Cherfils).

*

"Ĉu la Kronprinco mortis? — tio estas demando, kiun oni povas jesi."
La Kruco (25. 2. 15).

*

"Post tiu ĉi milito, kiel post ventego, la atmosfero freŝiĝos. La homaj brustoj libere spiros."
Lavis (fr.: Lavisse) en Armea Bulteno (1915).

*

"En ĉiu milito la decida momento proksimas la finon."
Kropotkin en La Homo Katenita (20. 8. 17).

*

"Ekzistas nur du rasoj sur la tero: homeca kaj germanaĉa."
Rudjard Kipling (13. 5. 17).

*

"La sola ĝena afero estas la vidvinoj, kiuj restos, sed... post ni, ili vivos en gloro." Lekont (fr.: Lecomte), 2. 9. 17.

*

"La milito ne estas malbona afero. Ĝi malpermesas al vi morti en viaj riĉaĵoj."
Ĉot (angle: Choat, usona ambasadoro).

*

"La milito estas apostolo kreita de dio por regenerado religia, morala kaj socia."
Episkopo de Bordo (fr.: Bordeaux).

*

"Faru demandojn al la miloj da tomboj en niaj regionoj, kaj el ĉiuj tomboj eliros la vortoj: Patrio, patrio!"
Episkopo de Ŝalon (fr.: Chalons), (30. 5. 17).

*

"La kareco de l' vivo, tio estas la prezo de l' gloro."
Mejer (Meyer), (15. 8. 19).

*

"El 50 000 naskitoj en 1919 en Parizo, 25 000 mortis dum la sama jaro."
La Mateno (12. 11. 20).

*

"La nombro da infanoj malfruigitaj, malnormalaj, malbonmoraj, degenerintaj, krimuloj, pligrandiĝis pro la milito." La Mateno (9. 12. 20).

*

"Niaj infanoj bone memoru la militon kaj estu pretaj, kiam necesas, lukti denove por la sama afero."
La Tempo (2. 8. 19).
Esp-igis Marso (Marceau).

---

kvankam ne solvitaj, ekokupas en la memortagoj unuavice la publikan opinion. Kaj fine, en Sovetio la 7. nov. 1917 forpremis tute malantaŭen la mondmilitan memoron; en la tago de l' batalhalto la civilmilito estis sur la tagordo, la demando pri ekzisto aŭ neekzisto de l' Soveta Potenco.

Depost la 7. nov. 1917 la batalo inter Kapitalo kaj Laboro eniris novan stadion. Kaj tial ĉi tiu dato restas tiom memorinda por la tuta laborista klaso.
N. B.

EL HISPANIO

Antaŭ kelkaj semajnoj, okaze de alveno de l' diktatoro en Barcelono, por soleni sian kvinjaran regadon, oni povis vidi en la barcelonaj stratoj afiŝojn kun ruzaj kaj senhontaj agitfrazoj de l' Patriotaj Unuiĝoj. Tiu afiŝumado okazis certe je instigo de Primo de Rivera mem. Fakte tiuj Unuiĝoj ne enradikiĝis la popolon. Kun la nuna reĝimo ankaŭ ili malaperos ĉar ili nur vivas per apogo de l' registaro. La anoj estas personoj, kiuj devas aliĝi por konservi postenojn. Ankaŭ multaj persekutitoj apartenas al ili, por ne plu esti ĝenataj de la polico. Komercistoj, aŭtomobil-kondukistoj k. a. ankaŭ estas "patriotoj" pro materiaj konsideroj: por ke oni ne monpunu pro io ajn ktp. Sed neniu estas membro pro konvinko.

En la menciitaj afiŝoj oni legas titolojn kiel: "Diktatoreco liberala" kun frazoj pri amnestio, kiun la diktatoro faris okaze de l' regjubileo (sed vere du tagojn antaŭe oni enkarcerigis pli ol dumil civitanojn sub preteksto de komploto); "Libereco de Laboro" kun alvoko, kompari nunan kaj estintan staton (tamen ekzistas miloj da senlaboruloj, kaj la okupitoj plejparte ne ricevas sufiĉe por manĝi kaj lui etaĝon). Kiam mi kopiis la tekston de l' afiŝoj, por fari mian artikolon, du laboristoj mokis min kaj opiniis min "patrioto". Hontigite mi forlasis tiun laboron. Malgraŭ tiuj afiŝoj la laboristoj ne forgesas, ke la registaro surmetis al ili salajrimposton, ke ĝi intencis plilongigi la okhoran labordaŭron, komencante en la teksindustrio. Sed ĉar la laboristinoj helpis al la K-doj en batalo, la burĝaj intencoj ne efektiviĝis. Mi mem observis, kiel malmulte atentas la popolo tiun propagandaĉon. Kelkaj anoj de l' Patriota Unuiĝo atendis, en loko, kie estis gluitaj la afiŝoj, por fotografi amasigon da personoj legantaj la afiŝojn. Sed ili ne havis okazon, ĉar neniam kolektiĝis pli ol tri legantoj. Tio okazas en lando, kiu akiris sidlokon ĉe la Ligo de Nacioj (pri kiu fakto ankaŭ gloras tiuj paperaĉoj).

Strikoj

En Sevilla kaj Barcelono estas projektitaj grandaj ekspozicioj por la venonta jaro pri diversaj teknikaj, ĉefe elektraj progresoj en tutmondo. La registaro havas grandan intereson, sed ne deziras ĝin elmontri, ke la ekspozicio en Barcelono ne estu tro sukcesa. Tial ĝi decidis samtempe okazigi alian ekspozicion en la belega urbo Sevilla. Antaŭ 3 monatoj nun okazis laborista striko en la ekspoziciejo de la andaluzia urbo. Vere la laboristoj ne povas vivi per salajro de 6 pes., eĉ la kvalifikitaj laboristoj ne ricevis pli. Sed la registaro deziregas samtempe malfermi ambaŭ ekspoziciojn; tial ĝi donis al la tiea


Iom pri la kooperativa movado en Svedio

(Daŭrigo)

Interskandinava kunlaboro kooperativa

La sveda kooperativa movado celadas internacian organizon, por tiel krei sendependecon de ĉiu privatkapitalisto. Estas, kiel foje diris la nuna prezidanto de K. F., la revo de la kooperativistoj havi proprajn plantejojn, koloniojn en la landoj de la fruktoj kaj spicoj mem; ekzemple por kafo, oranĝoj, kaŭĉuko, ktp. Havi proprajn fabrikojn por produktado de objektoj, kies uzo estas tre ĝenerala en multaj landoj ktp. Resume: krei internacian kooperativan ŝtaton idean, kies agoj povus plibonigi la vivnivelon de grandaj amasoj da homoj. "Ni agu, li diris foje, tiel, ke jam dum la vivo de nia generacio, la kooperativo estos tiel forta, ke ĝi havu proprajn ŝipojn, kiuj alportus al la diversaj membroj en la tuta mondo la kafon aŭ teon aŭ fruktojn, kiuj kreskis en propraj plantejoj, prizorgitaj de sampensanoj. Ni agu tiel, ke la monopoloj kaj la karteloj estu frakasitaj per la volo de la kooperativa movado... En Svedio la kooperativa movado kreskis sufiĉe por jam esti kapabla nuligi la kartelojn kaj ilian prezpolitikon. Oni timas la kooperativan centron, kaj ĝia nura ekzistado avertas la prez-plialtigan politikon trouzi la potencon, kiun havas la karteloj. Tri trustojn K. F. jam frakasis, kaj la kvara jam ricevis sian "mortkondamnon". Ĝi estas la trusto, kiu profitegas monon per fabrikado de "linoleumaj" tapiŝoj. K. F. intencas komenci fabriki tiajn tapiŝojn mem, kaj post komenco la sveda parto de la trusto — ĝi estas internacia — forfalos.

En la internacia celado K. F. jam faris la unuan paŝon. Mem oni nomas ĝin nur eksperimento. La tri kooperativaj centroj en Skandinavio — Svedio, Danio kaj Norvegio — fondis asocion "Nordisk Andelsforbund", kun ĉefkontoro en la dana ĉefurbo Kopenhago kaj filia kontoro en Londono. Tiu asocio prizorgas la aĉetadon de la tielnomataj kolonivaroj: kafo, spicoj, sudlandaj fruktoj ktp. por la bezono de la konsumsocietoj en la tri landoj. La "eksperimento" estis sukcesega. La interskandinava entrepreno estas pruvo, ke internacia kooperativa kunagado estas ne nur teorie, sed praktike ebla sur la bazo de konsumkooperativa agado. La entrepreno estas kiel pogranda aĉetanto kaj la maklera pago estis tre granda pro tio, ke la tuta skandinava kooperativa movado aperas kaj el unu centro aĉetas la varojn por tuta Skandinavio. La sumoj ŝparitaj per tia agado restas en mona fondaĵo, ĝis nun atinginta du milionojn da kronoj, kiu estos uzata estonte por starigo de ia por la tri landoj komuna industria entrepreno, komune posedata de la tri landaj centraj organizoj.



"Nia korto", Saltsjöbaden.

Organizaj novaĵoj

En la sveda kooperativa movado — kiel en ĉiu lando — estas kelkfoje konsumsocietoj, kies ekonomia rezulto ne estis tiel bona, kiel dezirinde — ofte kaŭze de mankanta intereso kaj kontrolo de la membroj. Tia stato estas laŭ la opinio de K. F. "malsana". La distriktaj revizistoj, pri kiuj mi parolis en iu artikolo, ja ludis iun rolon por la resanigo de tiuj "malsanuloj", sed kelkaj el la societoj estis tiel malsanaj, ke ili devis — kiel la malsanaj homoj, esti flegataj en malsanulejo. En la pasinta tempo oni lasis ilin morti kaj lasis al la bankrota administrado prizorgi la enterigon. Sed nuntempe tiuj malsanaj konsumsocietoj povas havi malsanulejan flegadon. Tiacele oni fondis apartan kooperativan societon, kiu samcele kun K.F. administras ekonomie malfortajn konsumsocietojn. Tiu societo en sia "flegado" nun havas sepdekon da konsumsocietoj kaj sukcesis el tiuj sepdek malgrandaj, malfortaj organizoj krei unu grandan. La societo estas organizita laŭ la modelo de la grandaj lokaj societoj kaj havas sian agadon en la tuta lando. Kiam oni en unu loko sukcesis, la membraro estas sufiĉe kooperative edukita kaj la "malsanulo" resaniĝis sufiĉe, la flegsocieto lasas al la resaniĝanto denove vivi per si mem.

La ŝuvendado estis por la konsumsocietoj ĝis nun granda problemo. La diversaj modeloj ja multfoje malhelpas elvendadon, kaj tio nature siavice respondas al plikarigo. Post granda diskuto en la lastjara kongreso (K. F. kongresas ĉiujare) oni decidis, ke K. F. havu rajton starigi ŝuvendejon en tiuj lokoj, kie estas oportune, kaj el tiuj lokoj vendi popece kaj pogrande. La demokratio de konsumsocieto ne perdiĝas pro tio. Aliaj formoj estas starigataj por la membreca rajto, kaj la rabato, kiun donas la societoj, tamen restas ĉe ili. Malgraŭ ke K. F. vendas la ŝuojn, la membroj havos sian rabaton per la loka societo. La nova metodo en la ŝuvendado celadas simpligon de la kooperativa vendado de ŝuoj en la lando. Estas eksperimento, kies rezulto montriĝos bona por la tuta kooperativa movado.

En sekvonta kaj lasta artikolo mi iom tuŝos la kooperativan loĝejkonstruadon, kiu estas tre grava rilate al la luprezoj en la pli grandaj urboj de Svedio.

John Johansson.

(Daŭrigota.)

---

provincestro severegajn ordonojn kontraŭ la strikantoj. La provincestro en manifesto deklaris, ke ĉiu laboristo, kiu ne reprenos la laboron dum 48 horoj, estos maldungata de sia mastro kaj ne retrovos laboron en la tuta provinco Sevilla. Kompreneble la provincestro fiaskis. Tion vidinte li enkarcerigis, persekutis kaj batigis la batalantojn. Li venigis aliprovincajn laboristojn profitante la ĝeneralan krizon. Malgraŭ tio li ne plene sukcesis. Ricevi ekzaktajn sciigojn pri la striko estas neeble, pro la severa cenzuro. Laŭdire dum la bataloj la strikantoj havis vunditojn kaj mortintojn; la provincestro estas, laŭ telegramoj, grave vundita "pro akcidento". Fine la laboristoj reiris la laborejon. La kontrakto diras, ke "oni pristudos la salajran aferon, kiam la laboristoj denove laboros, por solvi ĝin kiel eble plej juste por mastroj kaj laboristoj".

Fakto estas, ke kiam la registaro komencis devigi la laboristojn en la Barcelona ekspoziciejo pagi salajrimposton, oni strikis 1½ semajnon. La registaro arestis kaj persekutis. Fine venkis la tiranaro sub gvido de generalo Martinez Anido, la ĉefministro por internaj aferoj.

Nulsektorulo (Finota).

Ni ricevis regule vian ĵurnalon k sendis kaj post ricevo ŝanĝekzemplerон.

EL LA HISTORIO DE L' SOCIALISMO

6. La cirkula teorio de Leru[1]

Tiu ĉi teorio kontraŭas la teorion de Maltus, kiu vidas la kaŭzon de la mizero en la kreskanta plinombriĝo de l' terloĝantaro. La tuta teorio de Leru bazas sur la principo, ke la homo estas samtempe produktanto kaj konsumanto, kaj ke li retrovas en sia konsumo mem la elementojn por sia necesa produktado. Sendepende de sciencaj, filozofiaj, historiaj rezonoj P. Leru apogas sian teorion sur la sekvanta sperto:

"Mi aĉetis malnovan fer-morteron, tiam mi serĉis sablo-ŝarĝon de la Tamizo, ĉe la ponto de Vokshol (angle: Vauxhall). Mi trairigis tiun ĉi sablon tra diversaj akvodusôj, por esti tute certa ke ĝi ne plu enfermas teron. Mi pistis ĝin kaj mi reduktis ĝin al polvo tiel delikata kiel eble. Mi prenis tiam karbon el tero, kiun mi pistis. Mi prenis cindron de nia fajrujo, tielnomatan ŝtonkarban cindron. Fine mi prenis brikon, kiun mi same pistis. Mi faris, miksante tiujn ĉi substancojn, pulvoron minero-vegetaĵan. Mi miksis tiun ĉi pulvoron kun mia urino kaj miaj ekskrementoj, kaj mi elakiris teron. Mi malkovris, ke la kvanto da ekskrementa materio, kiun ĉiu homo donas dum unu tago, povas servi por konsistigi 12½ kilogr. da vegetaĵa tero. Mi farigis du kestojn starigitajn sur fostoj; mi plenigis ilin per tiu ĉi tero. Mi semis en ĝin fazeolojn. La sezono estis tre malfrua. La fazeoloj ĝermis, puŝis, kovriĝis per folioj, floroj, grajnoj. Mi vidis ilin portantaj belajn tuberojn, kaj unu el miaj amikoj, kiu estas en Ĝersej, faris la rikolton kiam mi forlasis Londonon. Mi aplikis la lecionon de saĝo, kiun dio donis al la homo en la vizio de Ezekiel. Mi elmontris, ke la homo estas reproduktanto de sia propra substanco."

Tiel la konsumo ne estas nur la celo de l'produktado, ĝi ankaŭ estas la kaŭzo; la vivo renaskiĝas el la morto, la produktado el la konsumo; kaj, kiel konkludo, ĉiu homo havas la rajton vivi, ĉar per la fakto mem, ke li konsumas, li produktas.

[1] france: Leroux.

VIVO DE TEATRA ARTISTO

Eble interesos la K-dojn aŭdi iom pri mia vivo. Mi estas 33-jara teatristo. Ĉar miaj gepatroj estis ludistoj, mi komencis labori sur la scenejo tre frue. Mi estis 9-jaruleto, kiam mi unue aperis antaŭ la publiko. Mi nun estas membro de la varietea flanko[1] de la teatra profesio, sed en la fruaj tagoj, kiam mi vojaĝis kun miaj gepatroj, ni multe pli laboris ĉe cirkoj ol ĉe teatroj. La laboro de ludisto en Britio estas jena: Ne same kiel en aliaj landoj, la kontraktoj ĉi tie estas nur de unusemajna daŭro, t. e. de lundo ĝis sabato. Dimanĉon oni ne laboras, sed oni ne povas profiti je tiu libera tago, ĉar dimanĉe oni devas vojaĝi al nova loko. Eble estas mencinde, ke nur depost kelkaj jaroj oni permesas, en kelkaj urboj, la prezentadon de mov-bildoj ĉe kino-teatroj dimanĉe. Sed eĉ nuntempe troviĝas multaj urboj, kie ĉiu dimanĉa prezentado estas malpermesata; tamen trinkejoj estas malfermaj. La brita ideo pri virteco estas tre stranga.

Ĉiuj artistoj devas troviĝi ĉe la teatro lundon matene por prepari materialon kaj por muzik-ripetado. Tiu ĉi lasta okazas ĝenerale je la 12-a horo. Je la 13.30 h. antaŭ ol foriri al tagmanĝo oni rigardas la semajnordan tabulon por konstati, kian vicon okupas nia "numero" sur la programo. La angla sistemo de prezentado estas la tielnomata "twice nightly[1]" (dufoje vespere). La unua spektaklo komenciĝas je la 18.30 h. kaj la dua je la 21-a. La iama fama sindikato Moss and Stoll[2], kiu posedis teatrojn en ĉiuj grandaj urboj de Britio, enkondukis tiun ĉi duopan sistemon de prezentado; kaj efektive ĝi estas trompaĵo, ĉar ĝi devigas la ludistojn kaj la orkestro-muzikistojn labori 24-foje anstataŭ 7 — tio signifas, ke ili vere laboras du semajnojn por unu semajn-pago.

Ne kontentaj je tiu ĉi sukceso, la estroj de tiu ĉi sindikato penis enkonduki ankaŭ posttagmezan prezenton sen plua pago. Sed la V. A. F. (Federacio de Variete-artistoj) kontraŭbatalis kaj sukcesis havigi al la artistoj pluan pagon por ĉiuj posttagmezaj spektakloj.

Sed depost la milito pro la severa konkurado de la kino-teatroj la angla Music Hall havis malbonajn tagojn. Nuntempe multaj artistoj estas senlaboraj. Kompreneble, same kiel ĉiuj aliaj kapitalistoj, la estroj profitas la okazon por malaltigi la artistajn salajrojn. Multaj personoj eraras: Ili pensas, ke ĉar la artistoj estas bone vestitaj, ne ekzistas mizero inter ili. Sed tio ne estas fakto. La artisto devas elegante vesti sin, ĉar lia metio tion postulas, sed tre ofte okazas, ke li ankoraŭ ne pagis por la vestaĵo, kiun li portas.

Por havigi al si laboron, la artisto devas viziti agentejon, kaj ĝenerale la atendĉambro estas plenigita je malfeliĉuloj, kiuj atendas por vidi lian moŝton — la agenton. Tiu ĉi sinjoro konsideras sin supera al la artistoj, kvankam ĉi tiuj donas al li vivrimedon. La agento ricevas 10% por nenion fari. La artisto devas elspezi monon por anonci sian "numeron" en teatraj ĵurnaloj, kaj se iu direktoro vidas la reklamon kaj deziras la artiston, li komunikas al la agentejo, kaj ĉi lasta sendas kontrakton al la artisto kaj por tiu ĉi "peza" laboro ricevas 10% de la artista salajro. Tre ofte ankaŭ okazas, ke oni subaĉetas la agenton kaj tiel havigas kontraktojn; tial oni ofte vidas malbonajn artistojn aŭ "numerojn", kiuj ne meritas okupi la pozicion, kiun ili ricevas.

La artista vivo estas kompreneble tre malcerta; unu jaron ĉio iras bone kaj la kontraktoj estas bonaj; dum alia jaro ŝajnas, ke oni ĉiam maltrafas la bonajn kontraktojn. Do se la artisto ne estas ŝparema, dum tiaj malbonaj jaroj li povas trovi sin en tre malagrablaj cirkonstancoj. La kondiĉoj, en kiuj oni laboras, estas ankaŭ tre malsamaj; kelkfoje la vestejoj estas tre luksaj kaj havas brakseĝojn, grandegajn spegulojn ĉe ĉiuj flankoj, ankaŭ eĉ telefonon, kiel ekzemple ĉe la Londona Coliseum, la plej grava variete-teatro de Britio. Aliflanke, eĉ en Londono ankoraŭ troviĝas teatroj, kie la vestejoj estas sub la scenejo, malsekaj kaj malbonodoraj; kaj kiam danca numero aperas supre, la polvo falas malsupren sur la kapon de tiuj, kiuj vestas sin sube.

Kaj nun pri la kolegoj. Nur tre malmultaj konsideras sin kiel laboristoj k. argumentas tiele: la teatroj apartenas al la kapitalistoj, do ni devas subteni la kapitalismon. Sed kiam oni demandas ilin, kiu plenigas la teatrojn? ili restas nenion dirante, ĉar kompreneble estas la laboristaro, kiu subtenas la teatrojn; la anglaj kapitalistoj iras al la Sudo de Francio, por amuzi sin; ili ne bezonas teatrojn, almenaŭ ne la specon de l' ordinara angla varieto, ĉar tiu ĉi estas konsiderata kiel popolamuzejo, sekve ne inda por la tiel nomata supera klaso. —

Pro la fakto, ke mi pasigis multajn jarojn sur la kontinento, mi estas sufiĉe bona lingvisto, sed mi devas kontraŭstari la aserton, ke scipovante la francan, germanan kaj anglan lingvojn oni povas trairi la tutan mondon. Tute ne.

[1] Mjuzik hol, angle: Music Hall.

[1] Elparolu: tvajs najtle.
[2] Elparolu: Mos end stol.

Je la nomo kaj adreso de la administranto ni instalis poŝtĉekajn kontojn en:

Stockholm, konto n-o 4268, kaj
Wien, konto n-o D.- 137725

TRA ESPERANTIO

Kiel mi trovis mian fraton per esperanto

En la tempo ĝis 1914 mi loĝis en Leningrado, mia frato Aleksandro estis finanta mezlernejan kurson en siberia urbo Omsk. Oni proklamis la militon; la frato estis soldatigata, mi ankaŭ, kaj post tri-kvar monatoj ni perdis unu la alian...

Venis 1917, februaro, oktobro, civilmilito, Denikin, Kolĉak, Judeniĉ ktp.... La ruĝa armeo venkis, la laboristaro ricevis liberan landon kaj komencis restarigi detruaĵojn kaj konstrui la Novon. Mi kiel ruĝarmeano trairis de Leningrado ĝis Batumo kaj en 1924 armeon forlasinte loĝiĝis en urbo Kutais (Transkaŭkazio). Kelkfoje mi anoncis en niaj ĵurnaloj serĉante mian Aleksandron, sed sensukcese, kaj perdis ĉian esperon lin retrovi. Unufoje mi legis en ĵurnalo pri esperanto, printempe 1927. Mi ekinteresiĝis kaj komencis studi ĝin. Post tri monatoj sentante mian povon uzi la lingvon mi aliĝis al SAT kaj SEU, abonis "S-ulo"n. Iom post iom mi komencis korespondadi kun ekster- kaj samlandanoj. Trarigardante Jarlibron 1927, mi trafis literon "O", legas "Omsk. 9453, K-do Borisov..." ktp. "Ho, mia kara frato, kie vi estas, kial mi ne estas nun kune kun vi?" tiel mi pensis, leginte "Omsk". Poste mi skribis babilleteron al K-do Borisov kun peto kontroli ĝin, ĉar mi estas komencanto kaj ne deziras havi multajn erarojn estonte. K-do Borisov kiel bona esperantisto sciiginte min pri la ricevo de mia letero, donis al mi eblecon denove skribi esperante al li. Jen kelkaj vortoj el mia dua letero al K-do B.: "... por mi estas tre agrable, ke mi havas nun K-don en tiu urbo, kie mi perdis mian fraton..." Kaj la 19. sept. de tiu ĉi jaro mi ricevis respondon: "... finfine mi trovis vian fraton..." Komence mi ne povis kompreni, mia kapo, koro ĉesis labori. "Ho! Mi tre dankas vin, K-do Borisov! Mi tre dankas nian lingvon esperanto!" Hazarde mi ellernis ĝin, hazarde trafis adreson de bona K-do, hazarde komencis korespondadi kaj hazarde trovis tion, pri kio mi jam multajn jarojn ĉesis pensi.

Jen, K-doj, mi ricevis per esperanto tion, kion mi neniam atendis.

Eruŝovskij, Tiflis (10 137).

Kiam mi unue vizitis Hispanion, mi jam bone sciis la tri cititajn gravajn eŭropajn lingvojn, tamen nek ĉe la stacidomo de Madrid nek ĉe la ĉefa poŝtoficejo mi sukcesis trovi iun, kiu povis paroli unu el la menciitaj lingvoj! Ĉe la poŝtoficejo tiu, kiu parolis france, estis for, kaj alia, kiu studis la anglan dum jaroj, ne povis kompreni min, kiam mi parolis. Mi devis skribi, kion mi deziris, kaj li respondis same! Do mi trovis, ke mi devas ankoraŭ lerni la hispanan lingvon.

Alian fojon, dum mia vizito al Suda Ameriko. En St. Paŭlo, Brazilio, atendante la vagonaron, kiu devis konduki min al Rio, oni arestis kaj aŭtomobile kondukis min al komisarejo. Tie estis neniu, kiu povis paroli angle, france aŭ germane, kaj nur ĉar mi jam komprenis la hispanan lingvon, mi povis sekvi al tio, kion diris la komisaro portugale. Oni telefonis al la brita konsulo. Kiam li alvenis por konstati, ke mi estas angliano, oni liberigis min kaj klarigis, ke la eraro okazis, ĉar mi similas al usona aventuristo, kiu sukcesis forkuri kun granda sumo el hotelo de la urbo. Tio montras, ke eĉ se vi scias kvar lingvojn naciajn, ofte tio ne sufiĉas.

Nu, antaŭ kelkaj jaroj, ĉar mi estas unu el tiuj teruraj ruĝuloj kaj legas Daily Herald (organon de la laborista partio), mi rimarkis en tiu ĵurnalo anonceton, kiu admonis lerni esperanton, mi decidis obei tiun konsilon. Tri monatojn poste mi havis okazon viziti Parizon kaj pere de La Homaro[1], en kiu mi vidis anoncon pri esperanto, mi havis la plezuron interparoli kun K-do Lanti. Mi timas, ke li multe penis por kompreni min pro mia tiutempa ne sperteco en la lingvo. Sed por mi estis granda okazintaĵo, ĉar li estis la unua malsamlingvano, kun kiu mi parolis esperante!

S. H. T. (7471).

[1] France: L'Humanité, ĉiutaga ĵurnalo de l' franca kom. partio.

Al laboristaj korespondantoj de ĉiuj landoj!

La Leningrada lab.-koresp.-organizo ampleksas laŭ lasta statistiko proks. 28 000 homojn. En Leningrado oni kalkulas 800 murgazetojn kaj saman kvanton da rondetoj. La lab.-kor-oj, gvidataj de komunista partio, estas la plej bonaj batalantoj por firmigi la proletaran diktatorecon kaj socialistan mastrum-konstruadon. Mankoj k atingoj de kolektiva laboro de niaj organizoj, de solaj specialistoj, de partianoj, de profunuiĝaj aktivuloj — ĉio estas klare spegulita sur paĝoj de nia murgazetoj k de nia gazetaro. Tio ĉi havas efikon. Ĉiuj atingoj de laboro, kreskado kvalita k kvanta neniom nin trankviligas, ni havas ankoraŭ milojn da mankoj, kiujn ni povas forigi post granda streĉo. Unu el la plej grandaj mankoj estas foresto de intern. ligo kun alilandaj lab. kor-oj. Lasttempe ni havis kelkajn dekojn da leteroj pri vivo de alilandaj laboristoj "ĝenerale"; tio estas bona. Sed nin, plumlaboristojn, interesas, kiel pasas laboro de labkoroj, kiom da murgazetoj oni eldonas en fabrikoj, kiel rilatas al tio la mastroj kaj burĝa registaro. Reciproke ni povas interŝanĝi praktikajn instrukciojn, kiel ĉe ni estas organizita laboro de labkoroj. La leterojn pri laboro de alilandaj labkoroj ni intencas dissendadi al niaj labkoroj, ankaŭ ni ilin enmetos nian gazeton "Rabselkor" (Laborist-Kamparana Korespondanto). Ni esperu, ke tiun grandan mankon de nia laboro ni kolektive korektos.

Respondeca sekretario de "Rabselkor"-fako ĉe "Leningrada Pravda", K. Kolbasov. (Vidu ankaŭ anoncon en n-o 208.)

Nun havebla!

Kongresa Protokolaro

de l' 8-a SAT-Kongreso en Göteborg

kun aldono de la Programprojekto de SAT kaj la kontraŭ-argumentoj de la Direkcio de SAT.

Interesega dokumento, kiun neniu devus preterlasi mendi.

64 pĝ. Nur 0,50 mk. g.

(Tiu prezo apenaŭ kovras nur niajn proprajn elspezojn.)

Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27

Koncernas adresojn

Jam multfoje estas atentigata en "S-ulo", ke la K-doj skribu pli legeble kaj precize, sed nur malgranda parto el niaj membroj kaj abonantoj zorgas pri tiu atentigo. La konsekvenco estas, ke multan valoran tempon oni perdas pro legado de tiaj leteroj kaj ofte ankaŭ poŝtkartoj. Estas nepre necese, se iu skribas al ni, ke li skribu plej klare. En la kuranta teksto oni ja facile povas deĉifri aŭ diveni, kion la skribanto deziras, sed se oni skribas sian adreson per la samaj hieroglifoj, tiam ankaŭ nia sperto forlasas nin kaj sekve la sendaĵo estos malĝuste adresita. Krom tio ni perdis multan tempon pro la malĝusta registrado de l' adreso en niaj libroj kaj sliparo. Kiu ne havas stampilon, nepre kaj ĉiam skribu sian adreson **preslitere.** Per tio vi povas al ni multe helpi en nia laboro. — Pluan ĉagrenon kaŭzas la malordema skribado de letero. Ekzistas K-doj, kiuj skribas leterojn kaj intermiksas ĉion. Jen oni skribas ion por la redakcio, jen por la adm., kaj inter ambaŭ skriboj oni krome aldonas ion pri privataj aferoj. Por ke tiu salato sufiĉe bone gustu, oni ankoraŭ surskribas ambaŭ flankojn de la letero. K-doj, kiuj havas tian "ordemon" en la skribado de leteroj, bonvolu atenti, ke ili estonte skribu aferojn por la redakcio sur apartan paperon, por ŝpari al ni tempoperdon.

Adm.

ESPERANTO-SERVO DE SAT

Raporto pri la 2-a kvaron-jaro de 1928

Kvankam ni prokrastis la publikigôn de tiu ĉi raporto ĝis nun, ni devas konstati, ke en la 2-a kvaronjaro de 1928 la raportado plej malbone funkciis. Kio kulpas, estas esplorata de ni; sed ni povas konstati, ke la raportado pri la 3-a kvaronjaro jam pli kontentige komenciĝis. Dum la 2-a kvaronjaro resendis raportfolion pri utiligo de nia materialo nur 17 Gek-doj el 11 landoj, t. e. apenaŭ 15%. Laŭ tiu tute m a l kompleta statistiko aperis 134 raportoj en 275 div. gazetn-oj. Krome sendis raportfolion K-do el Usono, kiu bedaŭrinde ne entenas taŭgan por ni statistikon, kvankam ni povas aserti, ke tiu K-do plej sukcese laboras. Sole el materialo de Esperanto-Servo li presigis raportojn en 26 n-oj de div. gazetoj. Plej ofte presitaj estas la raportoj: Katolika preĝejo servas kiel armilarprovizejo (rap.-n-o 1) 18-foje; Laboristoj kleriĝu (el Hungario — 48) 17-foje; Granda striko de tekslaboristoj en Jugoslavio (59) 17-foje; Konflikto en brita ŝpinindustrio (9) 15-foje; Tutmonda kongr. de prol. esp-istoj (107) 14-foje; La sorto de arbar-laboristoj en Kanado (181) 14-foje; Malŝparemeco de ŝtataj impostoj en Germ.?! (55) 12-foje; La reakcio kontraŭ la sobreco en Bulg. (63) 12-foje; En Varsovio 65% de l' infanaro drinkas brandon (71) 11-foje; Grandaj procesoj politikaj en Polio (99) 11-foje; Ekspluatado de indiĝenaj knaboj en Sud-Afriko (10) 10-foje; La batalo por amnestio en Bulg. (17) 10-foje; La fond-kongr. de la aŭstria ruĝa frontbat. asocio (71) 11-foje ktp. Nepresitaj nur estas kelkaj raportoj (laŭ ricevitaj rap.-folioj), sed ni eĉ ricevis gazetojn kun tiuj raportoj. Do, ni povas kuraĝe diri, ke ĉiu raporto aperis almenaŭ 1-foje. Tamen ni ne kontentas, kaj ni esperas, ke tiu publika admono efikos, ke pli da raportfolioj en estonto trafu nin kaj ni tiam ankaŭ povus publikigi pli kompletan raporton pri l' funkcio de Esperanto-Servo.

Ankoraŭ ni bezonas reprezentantojn en multaj regionoj kaj landoj, precipe malproksimaj de Eŭropo. Kiu kuraĝas partopreni nian peresperantan aparaton? Per- kaj por-esperantaj raportoj ĉiam estas bon-akceptataj, kondiĉe ke ili ne estas nur-teoriaj kaj politike unuflankaj. Sed ni tre deziras ricevi originale verkitajn raportojn pri ĉiaj okazintaĵoj. Sed oni evitu laŭeble tradukojn el tagĵurnaloj, ĉar tian gazetpriservadon pli rapide plenumas la telegraf-oficejoj, kiuj nature ĉiam spegulas burĝan tendencon. Des pli ni liveru al la gazetaro plej objektivajn prolettendencajn raportojn. Kaj tiucele ĉiu klaskonsciulo subtenu nin. En tutjara raporto ni pli detale parolos pri niaj rezultoj. Kaj ni esperas, ke la raporton pri la 3-a kvaronjaro ni jam povos publikigi post unu monato. Ja tio ne dependas de ni, sed sole de l' aktiveco de la SAT-anaro.

Centrejo de Esperanto-Servo de SAT,
Gerberstr. 24, Leipzig C 1 (Germ.).

——«o»——

ATENTU SOVETIANOJ!

Ofte okazis kaj okazas, ke niaj K-doj sendis al niaj agentejoj en Sovetio monon, kiu tute ne rilatas al nia SAT-movado aŭ tute ne havas ion komunan kun la SAT-administracio. Post apero de ĉi tiuj linioj ni rifuzos ĉiun ajn pagon, ĉu por privataj personoj, ĉu por fremdaj libroj kaj gazetoj. Samtempe ni atentigas niajn agentejojn en Sovetio estonte malakcepti monon, kiu ne estas destinita rekte por SAT.

Ni bedaŭras ĉi tiun paŝon, sed la kruda fakto devigas nin al tio, ĉar la popolkomisaro de financoj en Sovetio donis al nia agentejo en Moskvo la permeson nur por ioma limigita sumo, kiun ni rajtas ricevi dumjare kaj tiu sumo apenaŭ sufiĉas por enspezi nian propran monon.

Direkcio — Administracio.

NEKROLOGO

Kruele la morto ŝiras truojn en niaj vicoj. La 14. oktobro mortis post longa, terura malsano (ftizo) nia K-do

Hermann Remers (656)

en D ü s s e l d o r f. En li ni perdas unu el tiuj SAT-anoj, kiuj depost la komenco de nia movado kun ne ofte trovebla klareco ekkonis neceson kaj signifon de SAT. Li estis vera batalanto por la SAT-ideoj. Kiu el la Düsseldorfaj K-doj ne memorus lin, kiel li en la grupkunvenoj, entuziasmigite de la nova ideo, arde pledis por nia organizo kontraŭ SAT-indiferentuloj kaj kontraŭuloj? La multhora diskutado ofte fizike plene elĉerpis lin, la malica malsano dolore sentigis sin. Sian fervoron li pagis kare. Kiam lia sanstato ankoraŭ permesis tion, li akceptis dum jaroj esti peranto de SAT, kaj per sia energio li sciis plialtigi la nombron de membroj en D. La 2-a kongreso en Frankfurt, kiun li partoprenis, donis al li novan fortan impulson. Nelonge poste, en nov. 1922, li estis unu el la efektivigantoj de l' Eldon-Kooperativo, kies administradon li prizorgis, ĝis la Fako rapide grandiĝante transiris al Leipzig. Ne havante laborenspezon tiutempe, li donis sian lastan moneron al SAT. Estante simpla metallaboristo, subpremate pli akre ol aliaj de la kapitalisma sistemo pro sia daŭra malsanado, li posedis grandegan volon instruiĝi kaj kleriĝi. Ĉiam lernema kaj spertiĝema, li bonege posedis la esperantan lingvon kaj stilon, tiel ke kelkaj el liaj literaturaĵoj aperis en S e n n a c i e c a R e v u o. Pli ol 6 lastajn jarojn li ne plu laboris por la kapitalismo, ĉar li estis invalido, malgraŭ sia ekstera forteco kaj altkreskeco. Li ne plu povis servi al tiu sistemo, kiu disrompis, mortigis lin. La senlaborulo travivis jarojn de malsato kaj mizero, ĝis en malsanejo, ne plu povante sin teni ekster lito, li trovis rifuĝejon por morti malrapidan morton. Kapitalismo — murdinto! Denove ĝi rabis unu el la plej noblaj, plej sinceraj K-doj. Ĉiuj, kiuj konis lin, gardos honore lian memoron. Transprenu ni la standardon el mano de l' mortinto kaj estu ni sindonemaj, fervoraj batalantoj kiel li! N. B.

——«o»——

Moskvaj Centraj Ŝtataj Kursoj de esperanto

En Moskvo 14. 10. estas malfermitaj Centraj Ŝtataj Kursoj de esp-o. La kursoj preparas instruistojn, tradukistojn k korespondantojn de esp-o. Daŭro de l' tuta kurso estas dujara. Dum la unua jaro la lernantoj ricevas elementan konon de esp-o. Dum la dua jaro ili ekposedas la lingvon detale k, krom tio, studas historion de universalaj lingvoj, metodikon de instruado k metodikon de organiza k agitpropaganda laboro. Por la teoria kurso estas verkita speciala supera lernolibro de K-do Varankin, nun eldonata de CK SEU. Al la kursoj aniĝis 45 personoj. Instruas 6 plej bone kvalifikitaj instruistoj. Administras la kursojn K-do Varankin.

(1116)

PLANO DE LABORO DE ĈITA-A SAT-RONDO

Okazas ne malofte, ke sekretarioj de SAT-rondoj estas embarasataj por starigi programon de laboro. En la celo helpi al ili, ni publikigas ĉi sube la planon de unu fervora rondo por tri someraj monatoj 1928.

1. Studo:

Julio

1. Studo pri la SAT-Statuto per 4 raportoj: a) Celoj de SAT (rap. K-do Baĵenov), b) Membreco en SAT (Kiĉakov), c) Organizo de SAT (Kapustin), d) Servoj (Stelliĥ).
2. Agiteca raporto pri "S-ulo" (Fade).
3. Raporto: "Lenin pri Sennaciismo" (Laŭ "S-ulo" 129/30; Fade.).
4. Diskuto pri Kongrespropono 1 (de K-do Lanti) — Fade.

Aŭgusto

5. Diskuto pri la sektorsistemo de SAT.
6. Raporto pri Internacia Korespondado (Baĵenov).
7. Raporto: Esp-o en la ruĝa kaj en la burĝaj armeoj (Kapustin).

Septembro

8. 3 raportoj laŭ 3 partoj de artik. de Spiridoviĉ ("SR") "Skemo de la lingva evoluo".
9. 2 skizaj raportetoj pri a) Historio de esp. movado a n t a ŭ la mondmilito, b) Historio de esp. kaj SAT-movado p o s t la mondmilito.
10. Komenco de studo pri la decidoj de la 8-a SAT-kongreso.

Dum la tuta tempo:

11. Ĉiudimanĉe instru-horoj (Lekcioj de K-do Baĵenov pri naturparola metodo. Provlecionoj).
12. Ĉiudimanĉe mencio pri la plej gravaj artik. el lasta n-o de "S-ulo", kaj pri div. SAT-libroj kaj eldonoj.
13. Tralegado de plej interesaj leteroj, ricevitaj de grupanoj, kaj pridiskuto.
14. Kolektiva tradukado de leteroj kaj artik. el kaj en esp.
15. 2 demand- kaj respond-vesperoj pri div. temoj.
16. Laŭeble, ĉiam post la kunsidoj, ĥora kantado de revol. kantoj.

2. Praktiko:

1. Varb-agado por "S-ulo" (julio)
2. SAT-anigo de ĉiuj nealiĝintaj gegrupanoj.
3. Multobligo kaj dissendo de letero de Ĉita-a IRH-komitato al eksterl. IRH-organizoj (julio).
4. Kunligo de ruĝarmeanoj kun eksterlando.
5. Multobligo kaj dissendo de letero de Ĉita-aj komjunulaj organizoj al eksterl. kun salutoj okaze de Intern. Junulara Tago 2. 9.). Salutpetoj de div. eksterl. komjunul-organizoj (julio-aŭg.). Ricevitajn leterojn traduki kaj publikigi (sept.).
6. Dissendo de salutpetoj por 11-a datreveno de Okt. Revolucio, al div. landoj (aŭg., sept.).
7. Perado de interkoresp. de div. lokaj organizoj.
8. Regula tradukado kaj dissendado de let. kaj artik. por Ekstrem-Orienta Siberia gazetaro.
9. Statistiko de intern. koresp. en Ĉita.
10. Speciala penado kunligiĝi kun la orientaj landoj.

Plano konfirmita dum la kunsido de 1.7.28.
Sekretario: K. F a d e (3717).

Pri korespondvesperoj, ekspozicioj kaj similaj anoncpetoj

Anoncoj pri korespondvesperoj, ekspozicioj aŭ pri alsendo de salutleteroj (lastaj precipe el Sovetio) aperas en "S-ulo" sufiĉe ofte. Miaopinie la alvokoj plejparte rezultigas malmultajn respondojn, kiuj ne povas kontentigi la anoncintojn. Kulpas la anoncantoj mem: la anoncoj (ĉ. 50%) aperas tro malfrue. Jen konkreta ekzemplo: en n-o 207 estis anoncita "esp. ekspozicio" de Manchester'a Esp. Klubo, okazinta 13. 10. La gazeto, aperinta 20. 9., venis Tiflis-on 3. 10., alivorte tro malfrue por respondi la alvokon. Rezulte, al la loka grupo, antaŭ nelonge decidinta subteni similajn petojn, restis nenio ol... pense ekdeziri sukceson al la entrepreno de Manchester' aj K-doj!

Bagateloj, — diros kelkaj "poŝtkartmalamikoj". Laŭsperte, tamen, oni povas certigi, ke kelkdeko da PK, plaĉe aranĝitaj, estas ofte instigilo por esp. "konvertiĝo" kaj plua entuziasma laboro por prol. esp. movado.

Do, la anoncantoj, precipe izolululoj kaj grupetoj, pionire agantaj en lokoj de ankoraŭ malforta esp. movado, ne senkuraĝiĝu kaj ne kulpigu la indiferentecon kaj malhelpemon de alilandaj K-doj; atentu nur la kelkfojan averton de l' redakcio pri ĝustatempa alsendo de viaj anoncoj! Komisiite: R. Lorencson.

SAT-anoj ne pruntedonu vian Jarlibron al iu ajn. Ĉiam postulu, ke servopetanto montru sian membro-karton. Gardu vin kontraŭ profitemuloj kaj parazitoj!

Vero antaŭ ĉio!

Pravas K-do 5458 (n-o 172, p. 129) atentigante unuflankecon de prisovetia materialo. Prisilento de malbonaj flankoj de nia vivo neniel helpas al diskonigo de l' vero pri Sovetio kaj neniun konvinkos pri efektiva stato de niaj aferoj. Aliflanke, prisilentado estas eĉ malutila, prezentante ŝancojn al niaj malamikoj eluzi la unuflankecon kiel pruvon pri "kruela cenzuro", "senindulga partia jugo" ktp.

Ke malsukcesoj kaj mankoj ekzistas en Sovetio, estas nenia sekreto; ja ĉiu sovetia civitano kaj ĉiu alilandano povas senĝene legi pri tio en oficiala kaj partia gazetaro. La eraroj estas neeviteblaj; senkaŝe priskribante ilin, ni montru, ke tamen, malgraŭ ĉiuj malhelpoj, ni progresas. Estu niaj eraroj kaj malordoj, samkiel niaj sukcesoj, vojmontriloj por alilanda proletaro! R. Lorencson.

—«o»—

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Le Matérialiste, Laeken, okt., Ĉu religio estas priv. afero? Accion Social Obrera, Gerona, 13. 10., Ekon. tutm. interdependeco (Delaisi).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Daily Herald, Lond., 19. 10., The Plebs, Lond., okt./nov., recenzo de Lab. Esp-ismo (Lanti), de M. Starr, Der Deutsche Eisenb., Berl., 14. 10., Le 5 à 10, Strasbourg, sept., Signalen, Stokh., 18. 10., De Socialist, Amsterd., 13. 10., Las Noticias, Barcel., 30. 9., 14. 10., La Dépêche, Grenoble, 22. 10., Organizita lab-isto, Belgrad, 14. 10., Grafika laboristo, Zagreb, 13. 10.

Peresper. materialon enpresis:

Travail, Lyon, 20. 10., Ny Tid, Ĉikago, 28. 5. — 5 artik. de l' Gazet-Servo! dank' al la modela laboro de K-do Fröding.

Pri SAT-Kongreso enpresis:

Ny Tid, Ĉikago, 3. 9. (rap. de Fröding), New Yorker Volksztg., N. Jorko, 12. 9., (tre detala rap. laŭ gaz. servo, bone aranĝita de K-do Weder), Postmannen, Oslo, 1. 10. (detala rap. de iu norv. K-do). — Al la K-doj, kiuj tiel trafe laboras en la gaz. fako, ni publike danku, ĉar tia laboro plej utilas al nia movado. Ke ili trovu multajn imitantojn!

—«o»—

NIA POŜTO

4608. — Ni akceptas ĉiam plezure rakontetojn por "La Lern.". Sed tiu de vi sendita vere estas tro longa por enmeti. Ni atendas pli mallongajn.

9310. — Via PK alvenis tro malfrue por enmeti la tekston ankoraŭ ĝustatempe.

6659. — Ni utiligos vian rap.

13 059. — Mankas loko por via artik.

8358. — Vi trovos vian artik. en iu venonta n-o. Red.

Trokoff (Tirnovsko). — Tempon por private korespondadi mi absolute ne havas.

Ĥristov (Varna). — Vi forgesis enmeti tekston de via anonco. Adm.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Artur Quaiser, Weisskirchen, 143 ap. Kratzau, dez. koresp., L, PM. Resp. garantiata.

K-do R. Fischer (oficisto), Holeischen ap. Pilsen, dez. interŝ. PM, kĉl. K-doj sendu unue!

GERMANIO

K-do Westphal, Gerberbruch 20, Rostock, dez. koresp. kĉl., pref. kun lignaĵistoj, L, PI.

— 22-jara junproleto dez. koresp. kun Gek-doj, pref. el la marbordaj teritorioj franca, sveda aŭ alia k el norda Hispanio pri prol. junulmovado. Adr.: Karlo Pohle, Margaretenstr. 15/2, Mainz a. Rh.

K-dino Grenjo Bräuer, Mühlgrabenstr. 23, Hirschberg i. Schles., dez. koresp. kĉl., L, PK, PI.

Adresŝanĝo. — Gerh. Faber, Deutscher Ring 1, p. r., Wesermünde-G., bonvolu noti tion en la Jarlibro. Mi dez. koresp. kun anglaj K-doj.

NEDERLANDO

Adresŝanĝo. — K-do Joh. v. d. Zwaan, Wilhelminenstr. 28, A., Rotterdam, stratŝanĝo). SAT-anoj korektu en la jarlibro.

RUMANIO

K-do Remus Vasiluvici, str. Reg. Maria, 21, Deva interŝ. PM, kĉl.

SOVETIO

K-do A. Jurĉenko, Detkolonia Dzerĵinskogo, Poŝtkesto, 309, Ĥarkov, serĉas korespadon por esp. grupo ĉe domo de eksenzorgaj infanoj.

— Lernantoj de kino-mekanikista lernejo dez. koresp. pri kino, lab. vivo k interŝ. kinoĵurnalojn k gaz. Adr.: Rostov (Don), Krasnoarmejskaja, 1, ŝkola, 8 al K-do P. A. Volĉkov.

— Pri literaturo dez. koresp. kĉl. K-do Max Liber, Mordvinovskij per. 27, kv. 3, Ĥarkov, Ukrainio.

Gejunuloj! Letere partoprenu nian jubileon, la 29. de nov., okaze de l' X. datreveno de l' Unio junkomunista (Komsomol), sendu viajn k de viaj organizoj salut-leterojn. Adr.: **Saratov,** ĵel. dor. masterskie 5364.

— Grupo de gekomjunuloj (4 knaboj, 6 knabinoj), dez. koresp. kun gejunuloj pri div. temoj kĉl., kolektive k individue. Adr.: Ĥarkov, Puŝkinskaja, 31, tipografio Jacejka KSM.

K-do A. Varonin, str. Sverdlova, 85, Bogorodsk, Niĵegor. gub., dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

K-do Viktoro Ĵidkov (stud. elektro-teknikisto), Polevie zadvorki, 6, Sormovo, Niĵnij-Novgorod, dez. koresp. kun studentoj el ĉl. pri div. temoj, L, PK, PI.

K-do J. Mosolov (aviadisto), Dvorec-Muzej, kv. 25, Trock, Leningr. obl. dez. koresp. kĉl.

K-do A. Jadlovker nun loĝas: Aŝĥabad, Stavropolskaja, 22 (antaŭe en Turtkul). Pro mia senlaboreco mi nun ne povas koresp. Post kelka tempo mi nepre resp. al ĉ. miaj gekoresp-antoj.

K-do B. Miheev (16 j., junkom.), ul. Vodnikov, 25, kv. 2, Samara, dez. koresp. kĉl.

K-do Georgo Solovjev (konstrulaboristo), Portovaja 48, kv. 9, Sebastopolo, dez. seriozan koresp-adon kun samprofesiuloj el ĉl. pri labormetodo, vivkondiĉoj ktp., L, PK, PI. Resp. garantiata.

— Terkulturistoj, agronomoj, brutbredistoj el ĉl. mi dez. serioze koresp-adi pri specialaj temoj, vivkondiĉoj ktp., L, PK, PI, ilustraĵoj, gaz. Nepre resp. Adr.: st. Brasovo, Brasovski teknikumo, Brjanska gub. al K-do Bazilo Pokrovski.

— Esp. Grupo ĉe Narkompoĉtel dez. koresp. pri div. temoj kĉl. Certe resp. Adr.: Moskvo, Narkompoĉtel al Esperanto-grupo Glazunovoj.

K-do Johano Fallin (20 j., konstrulaboristo), Provorskaja ul. 8-a, Smolensk, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl.

K-do Konst. Palivoda, Terskaja, 26, Anapa, dez. koresp. kĉl., L, PK, PI. Nepre resp.

K-do Jakobo Kanevski, Jilanska str. 2, 5, Kiev, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

— Kleriga Fako de Fabrika Sindikata Komitato dez. koresp. kolektive kun junkom. ĉeloj, petas salutleterojn pro Okt. Revol. Adr.: Kiev, Arsenalska str. Krasnoznamenni Zavod, Zavkom.

— Komencanta grupo dez. koresp. kĉl., L, PK, gaz. Resp. garantiata. Adr.: P. Tilin (9310), Leningrad, Pr. Volodarskogo 9, Pisĉeprodukt al Esp. Grupo.

SOVETIO (Daŭrigo)

— Teksistoj de fabriko "RABOĈIJ", L e n i n g r a d, "29", fabkom., dez. koresp. pri la vivo de ĉl. teksistoj. Resp. garantiata.

— Fervojistoj de "PROLETARSKIJ ZAVOD", L e n i n g r a d, "29", klubo Kalinina, dez. koresp. pri la vivo de ĉl. fervojistoj. Resp. garantiata.

— Esper-rondetoj de "URB-AKVOKON-DUKILOJ" organizas en n o v e m b r o grandan varb-vesperon kun ekspozicio. Sendu propagandan materialon! Ĉiu estos rekompencota, L e n i n g r a d, ul. Sluckogo, 45, esper-rondeto.

— Komencanta grupo de Esperantistaj Labkoroj dez. koresp. L, Pl, gaz. jurn., fotoj kĉl. Resp. garant. P. Tilin (9310), L e n i n g r a d, Socialistiĉeskaja, 14, klubo Rabselkor de "Leningrada Pravda" al esper. grupo.

K-do Pargaĉevskij serĉas sian malnovan korespondanton K-don Ĥoves k dez. koresp. kun esp-istoj-poetoj interŝ. versajojn. B u h t a N a h t a h u, Sovetsk. rajona, Ĥabarovsk. okr., D. V. K.

K-do Ignatjev dez. koresp. pri terkulturado kun kamparanoj alilandaj. p. o. N a h t a h u, Sovetsk. rajona, Ĥabarovsk. okr., D. V. K.

— Kamparanoj k arbarlaboristoj dez. koresp. kolektive kun diversl. samokupanoj pri ĉ. temoj. Adr.: K-do Pargaĉevskij, B u h t a N a h t a h u, Sovetsk. rajona, Ĥabarovsk okr., D. V. K.

ATENTU!

Esperantista Laborista Grupo, **Budapest,** III. Selmeczi-u. 14, aranĝos grandan ekspozicion, por kiu ĝi petas materialon (gaz., PK, Pl, fotojn ktp.) el Sovetio, malproksima Oriento k Ameriko. Ankaŭ koresp-antojn ni serĉas.

Por sin perfektigi en scio de esperanto, 3 K-doj dez. koresp. kun eksterl. K-dinoj pri ĉ. temoj. K-doj Josef Kohlmaier, 68/43, K-do Franz Kaiblinger, 68/50, K-do Hans Eigl, 28/30, ĉiuj en **Niklasdorf a. d. M.** (Aŭstrio).

Sebastopola Esperanta Koresp. Oficejo

ĉe Redakcio "Majak Komuni" k Soveto de Sindikatoj organizas al la XI-a datreveno de Oktobra Revolucio grandiozan ekspozicion de kolektiva k individua koresp. tuturban. — K-doj kaj organizoj tutmondaj helpu al triumfo de esperanto en nia urbo. Sendu salutojn, ekspoziciaĵojn. Ĉiuj salutoj estos presitaj k gaz. senditaj al la aŭtoroj.

K-doj laboristoj kaj laboristaj organizoj!

La SAT-anoj de Saratov petas sendi salut-leterojn k gratulojn okaze de l' XI-a datreveno de l' Oktobra Revolucio (la 7. nov.) al la Saratovaj organizoj: 1. Distrikta Komitato de l' Kompartio, 2. Distrikta k Regionaj Komitatoj de l' Junkomunista Unuiĝo, 3. Al Unuiĝo de Prof-sindikatoj, 4. Al la redakcioj de "Volga Vero" k "Juna Leninano". La leteroj estu sendataj al adr.: **Saratov,** Kamiŝinskaja 155, al K-do Segal M. A. (por Komitato de SEU).

La 24. de novembro

la Societo de Esperantistaj Laboristoj en Oslo festos sian 10-jaran ekzistadon. En la festa ĉambrego okazos ekspozicio de esp. gazetoj k salutleteroj. K-doj! Helpu nin en nia propagando sendante salutleterojn k aliajn ekspoziciaĵojn laŭ jena adreso:

Societo de Esperantistaj Laboristoj
K-do Hilding Hansson
Sarpsborggt 16, III, opg. G, **Oslo,** Norv.

Fine! La "Universala Esperantistigilo" estas tute finita!

Laŭ la opinio de la esperanta gazetaro la verko estas — "geniaĵo", "juvelo pedagogia", "majstroverko", "pedagogia mirindaĵo", ktp.

S-ro Herbert M. Scott, redaktoro de "Amerika Esperantisto" kaj ano de la Lingva Komitato, diras — "Ĝi estas la 'rekta' metodo 'par excellence' ellaborita ĝis-ekstreme."

La kompleta kurso konsistas el dek libroj (lecionoj), pli ol 300 paĝoj kaj vortoprovizo de ĉ. 1,500 pretaj vortoj, el kiuj, kompreneble, per aplikado de la vortfaraj principoj de la lingvo, miloj da pluaj vortoj estas formeblaj.

Ĝi enhavas 2,300 originalajn bildojn, kiuj klarigas ĉiun el la 1,500 vortoj. La bildoj klarigas ne nur vortojn de objektoj kaj agoj, sed ankaŭ gramatikajn finiĝojn, regulojn, prepoziciojn, konjunkciojn, sufiksojn, prefiksojn, ktp.

Jen do estas valora donaco por kristnasko kaj por ĉiu alia tago de la jaro.

La unua leciono enhavas klarigojn en diversaj lingvoj. La jenaj nun estas haveblaj — — Angla, Araba, Belga, Bulgara, Ĉeĥa, Dana, Estona, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japana, Kataluna, Kroata, Litova, Nederlanda, Persa, Pola, Portugala, Rumana, Rusa (aliaj lingvoj estas preparataj).

Menciu la deziratan lingvon ĉe via mendo, kaj ne forgesu skribi vian adreson per p r e s l i t e r o j, ĉar tempo tute mankas al ni por deĉifri hieroglifojn.

La prezo de ĉiu leciono aŭ libro estas 0.15 usona dolaro, aŭ $ 1.50 por la tuta kurso el dek libroj. Ni pagas la afrankon.

Ni sendos al ĉiu esperantisto tute senpage nian nove konstruitan "korelativilon". Nur turnu la diskon- ZIP ... kaj la vorto klariĝas al ĉiu naciano, tute egale ĉu oni estas Franco, Turko aŭ Eskimo.

Benson School of Esperanto, Inc. 518 Broad St., Newark, N. J., USA.

RADIO AMATOROJ

Radio-Buro de Ĥarkova Distrikta Soveto de Profsindikatoj organizas korespondadon por radio-amatoroj.

ĤARKOVA RADIO-AMATORO ATENDAS VIAJN LETEROJN!

Adr.: USSR, Ĥ a r k o v, Dvorec Truda, kv. 63, Radio-Buro.

Moskva Supera Teknika Lernejo

Esperĉelo de studentoj
deziras korespondi kun studentaro kaj gelaboristaro de ĉiuj landoj pri diversaj temoj. Resp. garantiata.

Adr.: Moskvo 5, Voznesenskaja 20
Al K-do R u s a k o v.
Por esperĉelo de M. V. T. U.

La mondkonata porĵurnala agentejo

Henri Manuel, Paris

liveranta krom la ĉiutaga raportaĵo ankaŭ modon de la plej famaj francaj tajlorinoj, havanta la plej grandan arĥivejon de eminentularo
SERĈAS REPREZENTANTOJN en ankoraŭ multaj landoj. Precipe en Sovetio k Orientaj landoj.
Interesiĝantoj skribu al:
J. Grenkamp, 4 rue de Vaugirard Paris 6e

ATENTU, GEK-DOJ DE L' TUTA MONDO!

Ni, anoj de esperanta grupo, serĉas longedaŭran koresp-adon pri temoj proponotaj al ni. Volonte ni interŝanĝos PM, PK, Pl, ilustr. gaz., fotojn ktp. Por mi, loĝantaj en Ekstrem-Orienta parto de USSR, koresp-ado kun vi estos vigliga k interesa. Skribu — ĉu individue, ĉu kolektive: Respondo senprokrasta atendas vin! Ni esperas je via helpo. Adresu jene (nepre korekte k legeble):

Al K-do **Johano Sklemenov, s. Krasnij-Jar** Ĉitinskij okr. D. V. K., Siberio (USSR).

KIU

deziras interŝanĝi kun mi gazetojn, ĵurnalojn, pri diversaj demandoj? Skribu: **Ĥarkov,** Holodnaja Gora. Kulbickij per 12, kv. 6, Maslovskij B. Respondoj sendube garantiataj, senprokraste.

ENHAVO:

	paĝo
Datreveno dekjara kaj — dekunujara	41—42
Datrevena memorigo	42
El Hispanio	42—43
Iom pri la kooperativa movado en Svedio	43
El la historio de l' Socialismo . . .	44
Vivo de teatra artisto	44
Al laboristaj korespondantoj de ĉiuj landoj	45
Tra Esperantio	45—47
Korespondado, anoncoj	47—48

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)